FN PER ANC 47


# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

.unuiĝo de la normandaj esperantistoj

n°168 TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE:
JUNIO - 1990A - ( SOMERO 1990A - N° 83A - NOVA SERIO.)


## EN HEROUVILLE (14)

## ĜENERALA ASEMBLEO

### EN LA 20a - 21a DE OKTOBRO

*Chers Amies et Amis,*

*Les chambres de ceux qui parmi nous se sont inscrits à notre Assemblée Générale, sont déjà réservées, comme nous le demandait le Centre International de Séjour où nous serons hébergés.*

*"Mince ! Et moi qui n'ai pas envoyé mon bulletin d'inscription !" dites vous! Nous ne pouvons pas effectivement vous garantir une chambre au même endroit et dans les mêmes conditions. **INSCRIVEZ-VOUS TOUT DE MEME**, en nous indiquant votre numéro de téléphone. Nous ferons tout pour réparer cet oubli. Mais il faut agir le plus vite possible, maintenant.*

*Regardez le programme, il est varié et devrait convenir à tous. Nos réunions sont l'occasion pour faire connaissance ou pour entretenir de longues amitiés, et en Espéranto s'il vous plaît !*

*Une Assemblée Générale, c'est aussi le moment fort de notre association où chacun fait part de ses expériences, ses souvenirs, ses espoirs, son désir en un mot de batailler ferme pour la belle langue de Zamenhof.*

*Nous de vrons également dresser un bilan de notre action et fixer des objectifs pour l'année à venir. Il serait d'ailleurs souhaitable que vos remarques et critiques, vos propositions, paraissent dans le prochain bulletin. Merci de les **envoyer pour le PREMIER SEPTEMBRE** !*

*Gis Baldaŭ -*



*PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO P*

***SABATE***

*13 H 30 : Akcepto de la parto prenantoj*

*15 H 30 : Ĝenerala Asembleo*

*19 H 00 : Vespermanĝo*


*20 H 30 : **NIKOLIN'** kantas*
*G. **LAGRANGE** skeĉas*

***DIMANĈE***

*10 H 00 : Prelego de **LAGRANGE***

*12 H 00 : Tagmanĝo*

*13 H 30 : Vizito al muzeo por Paco*



"Antaŭ la enirejo de la memormuzeo stariĝas 13 stonoj de la 13 nacioj kiuj batalis sur la normandaj strandoj. Ili simbolas la komunan porpacan volon.

En Junio 1944, Caen iĝis la centro de la plej granda batalo, tiu de Normandio. Ne temis pri milito de popolo kontraŭ alia popolo, aŭ landlimaj konfliktoj, sed pri batalo por libereco, kontraŭ naziismo.


Loko por dialogi kaj priserĉi, la memorejo proponas vojaĝon en nian kolektivan memoron, dank'al la prizorgo de la plej eminentaj historiistoj. La Muzeo por Paco uzas la plej modernajn aŭd- kaj vid- teknikojn por ke ni ankaŭ pripensu nian nestabilan estantecon.

Ni estu atentemaj por ke liberoj kaj homaj rajtoj pli kaj pli prosperu !" Jean-Marie Girault, urbestro de Caen.

## LA GRANDA HALO

La Granda Halo havas multflankajn funkciojn. Akceptejo por la vizitontoj, ĝi al ili proponas librovendejon, mongiceton, ripozejon, sed gi ĉefe estas loko por memorfesti. De "Typhoon" ĝis la "Libro de la nomoj", de la detruo de Caen ĝis la atestaĵoj venintaj de Hiroŝima. Referenca kaj aktuala loko : telekso senĉese alportas novaĵojn pri la landoj kie nun okazas militoj aŭ agoj kontraŭ la homaj rajtoj.

## NIVELO 0 A -1 : FUŜITA PACO



1918 : Germanio estis venkita. Multaj tiam esperis ke neniam plu okazos militoj. La "Der des Der" kiel dirite. Kiu povis imagi ke, post dudek jaroj denove eksplodos nova mondmilito !

Paco maljusta, ekonomia krizo, faciligis la aperon de naziismo por kiu milito prezentiĝas kiel la

*solvo. Dume demokratiaj landoj malfortiĝis...*

***NIVELO -1 : NIGRAJ JAROJ POR FRANCIO***

*Multe pli ol la unua , la dua mondmilito mortigas la civilajn popolojn, bombardoj, reprezaljoj de la venkintoj*

*Ĉefe, ĝi estis konflikto sangoavida inter la subtenantoj, aktivaj kaj pasivaj de Reich-sistemo liberecomortiga kaj racista, kaj la aliaj kiuj rifuzis esti sub la jugo.*

***NIVELO -1 : TUTMONDA MILITO***

*Ekde la momento kiam Usono kaj Sovetunio partoprenis la militon, tiu-ĉi iĝis tutplaneda. Ĝisosta milito al kiu la partoprenintoj oferis ĉion, financojn, teknikojn, sciencojn, industriojn por produkti modernajn kaj pli kaj pli terurajn armilojn.*

*En 1944, timinda militŝiparo alpretiĝas por albordiĝo en Normandio por ataki Eŭropan kontinenton, sub la nazia jugo.*

***NIVELO 0 : ALBORDIĜO, NAZIISMO VENKITA***

*Hiroŝima kaj Nagasaki tragedie konkludas la duan mondmiliton. Ŝtatestroj klopodas por starigi novan mondordon, paceman.*

*Tamen tre rapide eksplodas novaj konfliktoj minacantaj pacon, liberecon, homajn rajtojn. Sed dank'al la senĉesaj klopodoj de bonvolemaj geviroj, dank'al evoluo tiuvojen de la generala opinio, naskiĝas espero ke la Homaro rifuzos rekrei kondiĉojn por nova tutmonda konflikto.*

*Tiu volo por vivi pace kaj fratece dependas de ni, ĉiuj.*

*Eksterlande pluraj subtenkomitatoj kreiĝis favore al la Memormuzeo por Paco. Senprecedenta fakto, en 1986 rezolucio estis voĉdonita de la Usona Kongresejo por subteni la muzeon.*

MEMORIAL CAEN NORMANDIE
Esplanade Dwight-Eisenhower, BP 6261, 14066 CAEN CEDEX Tél. 31.06.06.44

"ESPERANTO - NORMANDA BULTENO"
de l'Union des Espérantistes de Normandie.


Minimuma Kotizo por 1990 :45 frankoj.CCP 283 40 H ROUEN
Sendu vian poŝtĉekon rekte al via CCP Centro.
bankĉekon al Pierre Quillaud
16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly

Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois
14 200 Hérouville St Clair. Tel. 31 95 11 81

# alia Turismo al alia Mondo

## Vojaĝi? Jes, sed kiel?

Vi lernis Esperanton por intimiĝi kun aliaj mondanoj. Malfeliĉe, vi ne scias kiel tion realigi. Ekster la kongresoj, vi ne scias kion fari por ligi firmajn kontaktojn kun alilandajn samideanojn.




L'AMIKECA RETO estas servo, kies celo estas permesi ĉiaspecajn amikecajn rilatojn. Ĝi celas fundajn neordinarajn vizitojn, nekutimajn aktivecojn aŭ diskutojn.


L'AMIKECA RETO iras tien, kien la turistoj ne iras mem, ĉar mankas al ili la lingvo de la amikeco, la Zamenhofan...

**Vi aĉetu la ĉi-jaran gvidlibron per 30 F.F aŭ ekvivalento, aŭ per ia ajn rimedo...**

**Poŝtokonto:** Rollin: N° 1544 95 V: ĝircentro: La Source (F)
Adreso: Amikeca Reto: 63 rue de la République: à Chargé: F-37530-AMBOISE (Francio)

LA KULTURA ESPERANTO-DOMO

Kastelo "Grésillon"
F-49150 BAUGÉ – Francujo
telefono: 41 889 10 34



*havas por proponi al la internacia esperantistaro agrablajn, riĉenhavajn somer-renkontojn en tre turisma franca regiono.*

| | |
|---|---|
| *15-a de junio/ 02-a de julio* | E-kursoj, gvidataj konversacioj, ekskursoj, promenadoj, distraj vesperoj |
| *02-a/16-a de julio* | Serio de diverstemaj prelegoj kaj parolaj interŝanĝoj, ekskursoj kaj E-kursoj, distraj vesperoj |
| *17-a/31-a de julio* | "Lernu kaj praktiku": Kursoj, gvidataj konversacioj, ekskursoj, distraj vesperoj |
| *1-a/15-a de aŭgusto* | "Lernu kaj praktiku", kun novaj gvidantoj, promenadoj, ekskursoj, distraj vesperoj |
| *15-a/31-a de aŭgusto* | Kursoj por diversnaciaj lernantoj; "La arto traduki" (dum la dua semajno), gvidataj konversacioj, ekskursoj, distraj vesperoj |

ĈIUJN DETALITAJN INFORMOJN PETU DE LA ĈI-SUPRA ADRESO.
KONFIRMO DE REZERVADO NUR KONTRAŬ POŜTMARKO AŬ RESPOND-KUPONO.

# ALIĜILO

## Nepre Resendu ĝin ANTAŬ LA 1a de APRILO



NOMO (Nomo) :

PERSONA NOMO (Prénom) :

ADRESO (Adreso) :

AKOMPANOS MIN : Indiku kiom da personoj (indiquez le nbre de personnes vous accompagnant) [ ]

Mi deziras partopreni la Ĝeneralan Asembleon de U. N. E., laŭ la subaj kondiĉoj (Je désire prendre part à l'Assemblée Générale de U. N. E, sous les conditions ci-dessous).

ĈAMBRO (chambre) Unulita (à 1 lit) [ ] Dulita (à 2 lits) [ ]

| MI TRAKNOKTOS (nuit) * | PREZO (prix) | KIOM DA PERSONOJ | SUMO |
|---|---|---|---|
| VENDREDO VESPERE (Vendredi) | 65,00 | X | = |
| SABATO VESPERE (Samedi) | 65,00 | X | = |
| DIMANĈO VESPERE (Dimanche) | 65,00 | X | = |
| | | | SUMO |

* Nokto + matenmanĝo (nuit + petit déjeuner)

| MI MANĜOS (repas) | PREZO (prix) | KIOM DA PERSONOJ | SUMO | |
|---|---|---|---|---|
| SABATO VESPERE Samedi soir | 40,00 | X | = | + |
| DIMANĈO VESPERE Midi | 40,00 | X | = | |
| | | | SUMO | |

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| MI VIZITOS LA MUZEON Musée | 35,00 | X | = | + |
| | | | SUMO | |

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| ALIĜKOTIZO (cotisation) | 80,00 | X | = | |
| por studanto étudiant | 50,00 | X | = | + |
| por senlaboruloj chômeur | 50,00 | X | = | |
| | | | SUMO | |

MI PAGAS LA TUTAN SUMON AL (je verse la somme totale à) : "ASSOCIATION HEROUVILLE ESPERANTO"

ENTUTE/Total

LA ĈEKON MI SENDAS (je retourne le chèque et ce bulletin) al : NICOLAS YVES
17 37 Quartier du Bois
14 200 HEROUVILLE ST CLAIR

SUBSKRIBO : Signature